Zuriko
Esperanto-Societo 100-jara

Esperanto-Societo Zuriko estis oficiale fondita la 20an de decembro 1905 kaj ek de tiam seninterrompe ĉiam funkciadis. Tiunĉi daton oni festis per solena vespero en la Esperantejo.

laŭ informo de Dietrich Weidmann

Pollando
tutlandaj informtelefonoj

Jam du jarojn siajn telefonnumerojn disponigas al tiuj, kiuj deziras informiĝi pri Eo, du junulinoj en Krakovo: Krystyna Hawlena- Krzemińska (Krinjo) -012/4252160 kaj Malgorzata Nitkowska (Gosia) poŝtelefono: 0608 697230.

Informtelefono – ĉu bezonata hodiaŭ

Esperantistoj ofte opinias, ke nun interesatoj povas informiĝi pri Esperanto nure per interreto.

Tamen homoj ofte havas specifajn interesojn kaj bezonojn, volas informiĝi ĉe kompetentulo, ne investi tro da tempo por serĉado, fine, paroli kun homo. Kio estas pli efika ol la afabla homa voĉo, en kiu oni sentas zorgemon kaj emociojn, voĉo reaganta je ĉiu nuanco de la konduto de la telefonanto?

La voĉo enhavas emociojn, energion kaj pro tio ĝi povas pli facile ol malvarma – eĉ bela – teknikilo, krei emociojn, transdoni energion kaj tiu – laŭ la psikologia vidpunkto – estigas motivadon!

Konkludo

El la nombro kaj kvalito de la problemoj, kiujn ni solvas, rezultas – kaj nesufiĉo de la informado (cetere, ĉu informoj iam ajn povas enhavi ĉiun detalon, kiu interesas kiun ajn...?) – kaj multe pli ankoraŭ, la nesufiĉo kaj la grandaj mankoj de la agado!

Grave estas aŭdi opiniojn de neesperantistoj; ili kutime pli bone vidas la problemojn de la Esperanto-movado ol esperantistoj mem, kaj eĉ kapablas afable konsili …

laŭ informo de Maria Majerczak

Hungario
Humana Esperanta Asocio

Nia esperantista grupo fondis Humanan Eŭropan Asocion en 1989. Ni aplikadas kaj popularigas Esperanton sukcese, organizas programojn kaj servojn larĝskale. Ni jam akiris plurajn rezultojn en Hungario sole aŭ kunlabore kun Hungaria Esperanto-Asocio.

En 2002 en Ŝojtoro ni akiris grandegan (1000 m²-a bazterena, pluretaĝa domego kun 7000 m²-a ĉirkaŭaĵo) konstruaĵon, kie ni deziras elformi EK-on Eŭropan Kontaktcentron.

Pasintjare ankaŭ nia lando aliĝis al Eŭropa Unio, kaj antaŭe ni eldonis libreton ("Vojprovizo") por la eŭropaj parlamentaj reprezentantoj, kiun ili akceptis bone. De tiu okazaĵo nia asocio organizas specialajn eŭropajn projektojn. Nia asocio havas en ĉiu regiono membroasocieton, la oficejoj estas krom Ŝojtoro en la urbo Zalaegerszeg kaj Nagykanizsa (ĝi situas en okcidenta Hungario).

Pro la menciitaj rezultoj pli kaj pli da personoj lernas kaj uzas esperanton, kaj por la aktivaj membroj kaj kunlaborantoj ni ŝatus organizi spertakiran rondvojaĝon en via lando.

Ĉi-jare ni planas fakan esperantan vojaĝadon al via lando. Eble ni ŝatus renkontiĝi kun esperantistoj, kiuj jam havas sperton pri la eŭropa libro-revuoeldonado, konkursado al EU kaj organizado de diversaj projektoj/programoj. Ni ŝatus fari intervjuon por nia revuo Eŭropa Dialogo. De kiam, al kio vi uzas esperanton, aŭ pri via fako. Mi antaŭdankas por viaj informoj.

Jozefo Baksa, prezidanto
Humana Eŭropa Asocio
sojtoro@axelero.hu
telefono: +36/30/6424923

Kontaktoj

Kune al Kievo

Mi tre ĝojus, se ni povus kune vojaĝi al Ukrainio pro la Esperanto-aranĝo en Kievo dum somero (20-27.07.2006). Se vi emas iri tien, bonvolu informi min.

Janek Bender, Tel. 07156/437777

Esperantistaj pilotoj serĉataj

Mi nune laboras kun pluraj esperantistoj pri adaptado de Esperanto por aerkomunikoj. La celo estas starigi la terminaron en Esperanto plej eble adaptitan al frazeologio de radiokomunikoj. Por starigi provojn, ni serĉas nefranclingvajn Esperantlingvajn pilotojn (privatajn aŭ profesiajn) kaj aerkontrolistojn.

Guillaume Ciquera, liniopiloto
guillaume.ciquera@free.fr

Pri germana kulturo

Mia nomo estas Mohamed Gharbi, agnostikulo, 26 jaraĝa kaj naskiĝinto en Tanĝero, urbo ekstremnorde de Maroko je 14 km de Hispanio. Mi studas nun en Barcelono pri inĝeniero, kaj interesiĝas pri kulturoj de popoloj, lingvoj, scienco arto kaj sporto. Mi jam parolas la araban, la francan, la hispanan, la italan kaj la anglan.

Antaŭ kvar monatoj mi komencis lerni la germanan, kaj mi tre ŝatus havi kontakton kun germanaj geesperantistoj por praktiki tiun lingvon kaj scii pli pri la germana kulturo.

Gharbi Mohamed
Carretera de Vic, Nm 72, 3-4
08272 Sant Fruitós de Bages
Barcelona, España
gh79esperanto@yahoo.fr

Ĝemelaj altlernejoj serĉataj

Nia altlernejo estas unu el la plej unuaj privataj altlernejoj. Ni instruas devige Esperanton, germanan, ĉinan, korean kaj japanan lingvojn.

Unu el la plej gravaj taskoj de nia altlernejo estas starigi kontaktojn kun alilandaj samnivelaj altlernejoj por rikoltriĉe kunlabori en lernejaj kampoj, reciproke interŝanĝi gelernantojn, ekkonigi al alilandaj Esperantistoj pri kulturo, vivmaniero kaj nacia kutimo de Mongolio. Ni celas kontakti kun ĝemelaj altlernejoj.

Ulaanbaatar 210535
Bayangol Duureg., 2-r khoroo.
Esperanto-Onon Altlernejo/
Esperanto-Onon High School.
Tel: (ofica) 976-21-945548.
Batzaya Tsetseg-Ulziin
batzaya@magicnet.mn